

# **Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo merkredon la 21-an de aŭgusto 2014 per Skype.**

(Protokolo aprobota la 25-an de septembro 2014.)

## **Partoprenis:**

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim  
Anne Karin Bondhus en Bryne  
Ulf Lunde en Os (ekde punkto 5.)  
Mario Machlik en Tromsø (ekde punkto 2.)  
Amelie Matt en Tromsø (ĝis punkto 4.)  
Herman Ranæs en Trondheim

## **0. Tagordo**

Aprobata.

## **1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 28-an de majo**

Aprobata.

## **2. Broŝuro**

NJE eldonis broŝuron pri Pasporta Servo en 1998, kaj restas nur unu ekzemplero. Venis demando al NJE kaj NEL ĉu reeldoni.

Laŭ la estraro ni devus eldoni pli ampleksan kaj ĝeneralan broŝuron, ekzemple reproduktante tiun violkoloran broŝuron pri esperanto, el kiu restas nur kelkdek ekzempleroj. En ĝia nova eldono ni povus oferti pli da informoj pri Pasporta Servo. Ni ankaŭ devus aktualigi la ceteran enhavon. NJE diskutos, kiel ili povus tion realigi. NEL pretas kontribui al tio.

## **3. Seminario**

La tempo nun estas decidita : la 1-an de novembro, je la 13-a horo (ĝis proksimume la 17-a horo). Ni jam havas kelkajn prelegantojn. Ni reklamos pri tio en la membrogazeto kaj en nia hejmpaĝo.

## **4. Ekonomio**

La kasisto raportis pri la ekonomio: Skagen Vekst kr 45 235,- Skagen Høyrente kr 125 339,- La altinterezan konton ankoraŭ ne eblas administri en la ret-banko, pro tio ni devas plenigi kaj subskribi novan formularon, kiun la kasisto sendos perpoŝte al la estraranoj.

## **5. Jarraporto kaj jarkalkulo 2013**

La jarkalkuolo aperos en N.E. numero 4, kaj la jarraporto en N.E. numero 5.

## **6. Tombo de Haldor Midthus**

La bezono prizorgi la tombon nun estas registrita ĝis 2019. Tio kostos ĉirkaŭ 1200,- jare. La kasisto estos nia kontaktpersono, kiu administros tion. Pri tio Ulf sciigos la tombejon.

## **7. Peto de EEU**

EEU bezonas 100 000 eŭrojn kiel partan financadon por nova retejo pri lingvoj. EEU demandis al NEL, ĉu NEL povus helpi aŭ per financa kontribuo aŭ per informo al la membraro demandante ilin pri kontribuo.

NEL ne havas rimedojn apogi tiun projekton. Se la redaktoro de la membrogazeto volas, li povos pri tiu peto skribi en iu venonta numero de N.E., tiel informante la membraron.

## **8. Datoj por venontaj interkonsiliĝoj**

25/9, 23/10, 20/11, kaj 11/12 se ni bezonos.

## **7. Eventualajoj**

A, Herman Ranes rezervis BUL-hytta por la datoj 12-14 junio. Se NJE volos, tiam verŝajne ankoraŭ eblas mendi kelkajn kromajn tagojn por ili.

B, La ĉefartikolon verkos Mario por la venonta numero de N.E.

C, Ni elprovis la ret-konferencan sistemon appear.in por eventuala uzo dum la seminario. Ni devis bedaŭrinde konkludi, ke ĝi ne taŭgas por tio.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30 - 22:30

La venonta interkonsiliĝo okazos la 25-an de septembro 2014, Raportis Mario Machlik